



P A C O

Oficiala organo de Mondpaca Esperantista Movado (MEM)

la milito eviteblas

Mesaĝo al la partoprenantoj de Sesa
Internacia Renkontiĝo en Bydgoszcz

Tre estimataj gesamideanoj!

Salutante Vin kaj dankante vian ĝisnunan esperantistan aktivecon, mi povas konstati, ke ankaŭ via nuna renkontiĝo pere de interkonatiĝoj konsekvence helpas la pacmovadon.

La partoprenantoj de la esperantista pacmovado tendence agadas likvidi la militojn kaj krei pli bonan, pli belan, riĉenhavan vivon por ĉiu homo. Pro tiuj ĉi noblaj celoj ni pacamikaj esperantistoj, eldiras ĉiam, se la esperantistoj estas veraj adeptoj de Zamenhof, tiam ili devas labori, agadi por la konservado de paco, por interfratiĝo, por amikeco inter la popoloj. Al tiuj taskoj ni havas bonan rimedon: la komunan lingvon.

Bedaŭrinde kontraŭ ĉiu bonrezulto de pacagado, la internacia imperiismo faras konstantan tension, fabrikadon de amasmortigiloj, instigadon de militoj por gajni profiton el la vendo de armiloj. Pro tio, nia ĉiutaga tasko — kun viaj apogoj — estas la konigo de la decidoj de la Mondparlamento de Popoloj por Paco, kies rezolucio forte deklaris, ke la milito estas evitebla. La milita danĝero estas forigebla, se la progresemaj homoj en la tuta mondo kontraŭstaras al la militpreparoj. En tiu ĉi honora tasko Esperanto estas efika forto, ĉar se ni uzas ĝin por progreso de la homaro, tiam ni povas montri al la homoj ĝian utilon kaj neceson.

Ni, esperantistoj, havas plurajn korespondantojn en diversaj partoj de la mondo, kun kiuj ni povas konversacii pri la mondproblemoj, pri la homaj problemoj, pri paco kaj milito. Ni povas disvastigi la veron, senmaskigi la mensogon! Ni povas pruvi pere de normalaj kontaktoj, ke la liberaj kaj bazaj bezonoj dependas de la paco!

Kun konvinko ni diras ĉiam kaj ĉie, forte kaj laŭte:

Ne — al la milito!

Ne — al la konkuro de armado!

Ne — al la imperiismaj planoj!

Sed jes — al la paco!

Ni povas bari la vojon de la milito, se ni unuece agas por la pacaj celoj, sendepende de nia partipolitika starpunkto, religio, profesio kaj nacieco! Laŭ la suprediritaj pensoj, mi deziras al Vi sukcesplenan laboron, agrablan interkonatiĝon, feliĉon kaj bonan sanon por via propra vivo!

D-ro Imre Pethes
prezidanto de
Mondpaca Esperantista Movado

la plej grava problemo

Laŭ svisaj sciencistoj dum 5500 jaroj la homaro spertis 14315 militojn — etajn kaj malgrandajn, efemerajn aŭ centjarajn. Ili forprenis la vivon de 3640 milionoj da homoj. Ĉiu sekva milito estis ĉiam pli kaj pli sangoverŝa kaj ruiniga. La dua mondmilito forprenis 60 milionojn da viktimoj, ruinigis 150 milionojn da loĝejoj, kaj la materialaj damaĝoj atingis 66000 miliardojn da dolaroj. Sed ĉiuj militoj ĝis nun ekzistantaj aspektas kiel ludilo antaŭ eventuala tria mondmilito. La scienco kaj la teknika progreso venigis la armadon ĝis kolosa kaj komplika evoluo. La homo transformis la planedon al grandega municiejo! Amasigita estas tioma kvanto da termonuklea, ĥemia, bakteriologia kaj ankoraŭ plej diversa alia armilaro, kiu, se ĝi estus utiligita, venigus ne nur amasan pereigon de la homaro, sed ankoraŭ katastrofajn postsekvojn al la natura medio.

Pli ol tri jardekojn daŭras la nuklea erao, aŭ, kiel iuj nomas ĝin — „inkuba kontraŭbatalo ĉe la rando de la abismo“. La militaj elspezoj en la mondo en 1980 superis 400 miliardojn da dolaroj — pli ol unu miliardo ĉiutage, pli ol unu miliono en ĉiu duminuto. La nombro de la nukleaj ŝarĝoj, pretaj esti elpafitaj per „strategiaj“ raketoj plimultiĝis de 3700 en 1970 al pli ol 12000 en 1980. Ilia eksplodforto egalas 1,3 miliardojn da bomboj kiel tiu, kiu ruinigis Hiroŝimon. Kaj unu termonuklea bombo de 1 megatuno povas neniigi la vivon de kelkcentoj da miloj da homaj estaĵoj.

La decido de Usono komenci produktadon de flugiraketoj kaj aliaj sistemoj de novaj armiloj, kiel ankoraŭ la akceptita de NATO „longedaŭra programo“ por pliigi la militelspezojn kaj instalii en Okcidenta Eŭropo raketojn kun mezdistanca flugo, metas la komencon de ankoraŭ pli danĝera etapo de vetarmado. Kaj la fama direktivo sub numero 59 de Carter por „limigita nuklea milito“ ankoraŭ pliakrigas la internacian atmosferon.

En la progresema monda socio ĉiam pli laŭtiĝas voĉoj de saĝo. Oni pristudas kaj enketas, publikigas raportojn kaj librojn pri la katastrofaj postsekvoj de nuklea milito, kiel por la homaro, same tiel por la natura medio. En la raporto de specialistoj, kiuj laboras la programon de UNO por protekto de la medio, oni montras la dezertigajn postsekvojn de la armokonfliktoj kaj la elspezitajn rimedojn, utiligeblajn por la prospero de la homoj kaj protekto de la natura medio.

— El proksimume 130 militoj, okazintaj ekde 1945 ĝis nun, dek du kaŭzis kolosajn neniigojn

de la medio. La Nordamerika militmaŝino kaŭzis damaĝojn de la naturo sur grandiozaj spacoj de la vjetnama teritorio.

La komuna detrua forto en la mondaj arsenaloj en la lastaj tridek jaroj kreskis kelkmilionoble.

— Ĉirkaŭ 40 procentoj el ĉiuj sciencistoj en la mondo dediĉas siajn laborojn kaj konojn al la milita afero. Kaj tiu intelekta personaro el 400 000 kvalifikitaj specialistoj, kun la disponigitaj plej modernaj laboratorioj kaj alia teknika bazo povus labori por solvo de ĉefaj problemoj: polucio de la vivmedio, malsato, soifo, krudaĵoj kaj energio, likvido de la malprogreso kaj malsanoj en multaj landoj.

— De la dua mondmilito ĝis nun la homaro elspezis pli ol 6000 miliardojn da dolaroj por armiloj kaj militpreparo. Per tiu mono oni povus konstrui loĝejoj por pli ol 500 milionoj da familioj kaj sekurigi panon por ĉiuj homoj en la mondo. Malpli ol 10 procentoj de ĉiuj militelspezoj sufiĉus por neniigi ĉiujn malsanojn de epidemia karaktero kaj ankoraŭ la analfabetecon.

Lastatempe ĉiam pli ofte aperas sciigoj pri sekreta malapero de centoj da kilogramoj da riĉigita uranio kaj plutonio de la atomaj centraloj de la okcidentaj ŝtatoj. La spuroj kondukas al iuj ŝtatoj, kiuj tre emas havigi al si „la malpermesitan frukton“. Oni asertas, ke iuj landoj sekrete produktas nuklean armilaron. Danĝera, stulta ludo per la „nuklea fantomo“!

Kiel oni emfazas en la raporto por protekto de la natura medio, plej granda minaco por la homaro estas la eksplodo de nuklea milito en la mondo. Neniu specialisto garantias, ke la homaro transvivos la mondan nuklean militon.

Unuj el la plej danĝeraj malpurigantoj de la natura medio, minaco al ĉiuj vivaj estaĵoj de la planedo, estas la radioaktivaj izotopoj aperantaj rezulte de eksperimentoj per nuklea armilo. De 1945 ĝis 1978 oni faris 1165 nukleajn eksplodojn. Tiuj eksplodoj estis konsiderinde limigitaj post la internaciaj kontraktoj por malpermeso de la eksperimentoj per nukleaj armiloj en iuj sferoj. Tamen ĉiam ankoraŭ unu triono el la landoj ne subskribis la kontrakton por nedisvastigo de la nuklea armilo kaj dektri el ili havas reaktorojn kaj disponas nuklean kapaciton. Ĉinio kaj Fran-



la neŭtrona armilo

Per kio kaj por kiuj ĝi estas danĝera

Kiel sciante, la plej grandan minacon por la vivo de la homoj kaj por la estonteco de la homaro prezentas la nuklea armilaro. Sed en sia strebo al milita supereco la usona imperiismo kaj la militaristaj rondoj de NATO kalkulas nome pri ĝi, puŝante la mondon al vetarmado antaŭ ĉio en la nuklea armilaro.

Nova pruvo pri tio estas la decido de la usona registaro produkti neŭtronan armilon — variaĵo de la rimedoj por realigi nuklean frapon. Dum multaj jaroj en Usono oni laboris por kreo kaj produktado de simila armilo. Sed pro la amasa kontraŭstaro de la internacia publika opinio, Usono ne publikigis la posedon de tiu armilo. Kaj nome la 6-an de aŭgusto, en la tago de la 36-a datreveno de la atombombo de Hiroŝima, la prezidento de Usono ĉinike surpaŝis la memorhonorigon de la viktimoj de Hiroŝima kaj deklaris la decidon de Usono produkti amase neŭtronan armilon.

Nur neinformitaj personoj povas kredi al la asertoj, ke la neŭtrona armilo estas kvazaŭ „plej humana“ armilo por militado, kapabla neniigi nur objektojn sur la batalkampo kaj neniel damaĝi la civitanan loĝantaron. Tiu aserto simple estas mensogo, kiun Pentagono uzas por fari vojon al la aserto, ke estas eblaj „limigitaj“ nukleaj militoj, ke estas permeseble uzi nuklean armilon.

La neŭtronaj batalrimedoj estas armiloj kun ĉiuj karakterizaĵoj de ĉiuj ceteraj nukleaj armiloj. Post eksplodo de neŭtrona bombo kreiĝas frapondo, varmradiado, aperas radiaktivaj restaĵoj. Diference de la ceteraj nukleaj armiloj

formiĝas tre danĝera neŭtrona elradiado, minacanta ĉiun vivan estaĵon.

Laŭ la opinio de okcidentaj specialistoj la uzado de neŭtronaj bomboj eĉ kun kompare malgrandaj potenc-dimensioj kapablas detruiri ĉiujn konstruaĵojn kaj instalaĵojn en radiuso de 150—300 metroj de la epicentro (sismopunkto) de la eksplodo. Pereos la homoj en la kaŝejoj en radiuso de 800 metroj kaj oni ricevos mortigan dozon de radiado en radiuso de pli ol kilometro kaj duono. Je pli grandaj distancoj la homoj ricevos dozojn de radiado provokantajn radian malsanon. Pereos la tuta faŭno sur surfaco de 520 hektaroj, la juniperaj arbaroj—sur 310 kaj la larĝfoliaj—je surfaco de 170 hektaroj. Eĉ la restintaj netuŝitaj post la eksplodo objektoj en la menciita centro de influo de la neŭtrona bombo, inkluzive la metalajn konstruaĵojn, la grundon kaj la nutraĵproduktojn, daŭre produktos neŭtronan radiaktivan radiadon.

Ne estas sekreto, ke la strategoj en Pentagono planas instali neŭtronan armilon precipe en la okcidenteŭropaj landoj — aliancanoj en NATO. Ne estas malfacile kompreni, ke en la dense loĝata Eŭropo la uzado de neŭtronaj municioj eĉ malgrandpotencaj prenos viktimojn ankaŭ el la loĝantaro. Nur kelkaj similaj obusoj tute sufiĉus por neniigi ĉion vivan en kiu ajn granda urbo. Kaj ties amasa uzado rezultigos la tutecan mortigon de la loĝantaro proksime al la batalregiono.

La eŭropa kontinento estas la ĉefa, sed ne la sola regiono, kiu povas estiĝi viktimo de la usonaj militaristoj. La militministro de Usono jam deklaris, ke Pentagono uzos tiun ĉi armilon ĉie tra la mondo. Al ĉiam pli kreskanta minaco estas submetitaj ankaŭ aliaj mondregionoj: la Prok-

cio, kiuj ne subskribis la kontrakton, daŭrigas tiujn eksperimentojn, surŝutantajn la planedon per radioaktivaj restaĵoj.

Kiam oni pritraktas la problemon pri la homoj kaj ties vivmedio, unue staras la demando pri la monda paco. En 1980 la soveta registaro starigis por pritrakto de la Asembleo de UNO la demandon „Pri la historia respondecado de la ŝtatoj por protekto de la tera naturo por la hodiaŭa kaj estontaj generacioj“. En la proponita projekto de rezolucio estas montrite, ke la konstanta vetarmado havas pereigajn postsekvojn por la homa medio kaj limigas la eblojn pri internacia kunlaborado kaj protekto de la naturo de nia planedo.

La dokumento alvokas la ŝtatojn en intereso de la hodiaŭaj kaj la estontaj generacioj havi zorgon kaj fari necesajn aranĝojn, inkluzive legajn,

pri protekto de la naturo, kiel ankaŭ por akceli la internacian kunlaboron tiurilatan.

La antikva romia sentenco „Se vi volas pacon, pretigu vin por milito“ estas ne-revenigebla arĥaismo. En la „nuklea erao“ la milito ĉiam pli fariĝas absurdo. „La nuklea paco“ ne povas esti garantiaĵo por la internacia sekureco. La ununura prudenta solvo estas la malarmado, kiu ebligas la venkon al la timo, firmigos la kredon de la homo al la estonteco de la civilizacio. Nur per malarmado oni povas forigi la „nuklean inkubon“ pendantan super la homaro, vivi sen timo pro milito.

El bulgara: Minko Conkovski

Gloso

polucio — malpurigo de la vivnecesa medio.

sima kaj la Meza Oriento, Afriko, Latinameriko, Suda Azio kaj ĉiu zono de la mondo, kiun Vaŝingtono bonvolus deklari „sfero de vivintereso de Usono“.

Aprobinte la decidon pri produktado de neŭtrona armilaro, la gvidrondoj de Usono intence komplikas la akriĝintan sen tio pro ilia kulpo internacian situacion, puŝas la mondon al nova etapo de vetarmado. La produktado kaj la instalado de neŭtrona armilaro plifortigas la militminacon en la mondo, malstabiligas la militpolitikajn cirkonstancojn. Pro kaŝi kaj pravigi siajn planojn kaj intencojn, la usona registaro kaj la gvidantoj de NATO asertas, ke ili postrestis en la armado kompare kun Sovetunio kaj tial strebas atingi ĝin.

Kompreneble, tio estas laŭ opinioj de militspecialistoj, tute malvera. Ne unufoje estis deklare de plej respondecaj gvidantoj de Usono kaj aliaj okcidentaj landoj, ke ekzistas proksimuma ekvilibro en la armado de NATO kaj de la landoj de la Varsovia Pakto. Tion emfazis ankaŭ Carter mem subskribinte en Vieno la dokumenton SALT-2. Sed per la mitaj asertoj pri „postrestado“ Usono kaj NATO celas maski la gigantajn dimensiojn de siaj agresemaj militpreparoj, almetante al ĉiuj ceteraj armiloj ankaŭ la neŭtronan.

Plifortigas la minaco de tutmonda nuklea milito. Tion rekonas ankaŭ la kanceliero de FRG Germanio Helmut Schmidt: „Oni ne devas trakti la neŭtronan armilon kiel pure defendan. Kiel la plimulto da armiloj en la mondo, ĝi kompreneble povas esti tutplene uzita por atako“.

Neniigante la limon inter nukleaj kaj nenukleaj bataloperacioj la neŭtrona armilo pligrandigas la minacon pri eksplodo de nuklea konflikto kapabla plikreski en universalan nuklean katastrofon.

Jen kial la neŭtrona armilo estas duoble danĝera: ĝi povas plenumi la rolon de eksplodilo de tutmonda nuklea milito. Tiuj, kiuj puŝas la evoluon de la situacio al tiu direkto, certe ne povas garantii al si sekurecon eĉ sur usona teritorio.

Ĉar la neŭtrona armilo estas fabrikata en ĝia nuna formo precipe pro la eŭropa militteatro, la plej granda minaco por la decido de la usona registaro direktiĝas al la eŭropaj popoloj. La plej reakciaj rondoj en FRG jam deklaris, ke la neŭtrona armilo devas tuj instaliĝi en FRG, kiu sen tio estas la plej granda nuklea deponejo de NATO en Eŭropo.

Iuj eŭropaj landoj formale ne konsentas kun Usono pri instalado de neŭtrona armilaro en iliaj teritorioj. Usono tamen estas preta neglekti ties formalan malkonsenton, metante la okcidenteŭropajn registarojn antaŭ finfaritajn faktojn. Laŭ la kontraktoj de Usono kun FRG eĉ ne estas necesaj konsultiĝoj pri importado de neŭtronaj armiloj por la usonaj armeoj en FRG.

Provante ĉiumaniere malfaciligi la traktadon pri limigo kaj sistema neniigo de la nukleaj armiloj, Vaŝingtono malhelpas la malarmadon kaj certigas al si vojon por instalado en Okcidenta Eŭropo de raketoj kun mezradiusflugo kaj poste de neŭtrona armilo. Pro tio la aprobo de internacia konvencio pri reciproka rezigno de la ŝtatoj pri produktado de tiu armilaro plene respondas al la tasko pri fortikigo de la paco en intereso de ĉiuj popoloj kaj ŝtatoj. La amasa publika opinio en diversaj landoj energie protestas kontraŭ la decido de la usona registaro. Ĉesigi la disvastigon de la atommorto, bridi la atommaniulojn — tiun taskon devas meti antaŭ si ĉiuj honestaj bonvolemaj kaj sobre pensantaj homoj.

Kompilis: N. Al.

La eksa Prezidento kontraŭ... la aktuala

La eksprezidento de Usono Carter kritikas la danĝeran laŭ li nedeziron de la aktuala prezidento Reagan alpaŝi al intertraktado por kontrolo de la armado.

Carter ne estas originala pri sia starpunkto, kvankam la bonsencaj pensoj venis en lian kapon kun granda malfruiĝo.

La leviĝinta en la tuta mondo potenca protesta kampanjo kontraŭ la usona strebo al senĉesa vetarmado estas elokventa laŭ si mem. Ĉie la homoj kun sana menso demandas sin: „Kiamaniere oni klarigas la fakton, ke ŝtato kun tia grandega potencialo el materialaj kaj intelektaj fontoj, kia sendube estas Usono, venis al simila senrespondeca elpaŝo al vivgravaj mondaj problemoj? Ĉu la eksprezidento konscias, ke parto de la kulpo pri tio kuŝas ankaŭ sur liaj ŝultroj?“

La respondo al tiuj demandoj oni devas serĉi ne nur en la ŝovinisma ideologio de la tiel noma-

taj „konservativuloj“, kiuj venigis al la regpotenco la nunan registaron de Usono, sed ankaŭ en la politika heredaĵo de la antaŭaj registaroj, kiuj fakte preparis la vojon al la ŝtata gvidposteno de la aktualaj gvidantoj de Usono. Ni rememoru nur la vortojn de la eksprezidento Eisenhower en 1960, kiu trovis en si kuraĝon kaj saĝon averti la usonajn politikistojn, ke estas ege danĝere prezenti pli grandan liberecon al la „milit-industria komplekso“, ĉar ĝi estas forto, kiu povas puŝi Usonon tre malproksimen sur la vojo al pereoj!

Tiuj vortoj esprimis ne nur averton pri la estonteco, sed ankaŭ memkritikan pritakson de la milita strategio kaj politiko de Usono en la periodo de la tiel nomata „malvarma milito“.

Bedaŭrinde, la sekvaj prezidentoj ne komprenis la signifon de tiuj avertaj vortoj kaj de sia respondeco kiel antaŭ sia propra lando, tiel ankaŭ antaŭ la cetera mondo. Plej okulfrapa ek-

ekumena VOĈO de paco

Sovetunio. Patriarko de Moskvo kaj de Ruslando Pimen: „La rusa ortodoksa eklezio instigas parlamentanojn de ĉiuj ŝtatoj efike kontribui al tio, ke popoloj de l'mondo ne estu ĵetitaj en ĉion absorbantan incendion de l'atomkatastrofo.

Tiacele gravas ankaŭ porpacaj iniciatoj de plej diversaj religiaj rondoj, reciproke kompletigantaj kaj kune kreantaj grandan potencon, kiu kunlabore kun ĉiuj homoj de bona volo povas konstrui nevenkeblan baron kontraŭ sendia frenezeco de militinstigantoj. Mi estas konvinkita, ke ek estas konvena tempo por aranĝi Mondkonferencon de reprezentantoj de gravaj agantoj de mondreligioj, cele gardi la vivon kontraŭ minaco de ĝia nuklea neniigo. Ni ŝatus fariĝi gastiganto de tiu ĉi internacia religia forumo.“

Rumanio. La internacia sekretariejo de la Kristana packonferenco (dum ĝia kunsido en Bukureŝto): „Fabrikado de neŭtrona bombo estas danĝera impulso por plukresko de febra armado, pligrandigo de internacia streĉiĝo kaj minaco de ekzisto de la tuta homaro. Por haltigi tiun ĉi danĝeran evoluon ni pretas aktive subteni la iniciaton de patriarko de la rusa ortodoksa eklezio Pimen, kunvoki printempe 1982 en Moskvo Mondkonferencon de religioj por paco.“

Vatikano. Papo Johano Paŭlo la 2-a (el lia dimanĉa parolado 30. 8. 1981 jaro): „La datrevena tago de komenco de la 2-a mondmilito, rememorata la 1-an de septembro, ne estu nur historia dato, sed fortimiga averto, instiganta nin ne allasi novajn militkruelaĵojn kaj nukleajn tragediojn. La tuta homaro preĝu por paco, aktive batalante

por malarmado kaj likvido de ĉiuj nukleaj armiloj.“

Usono. La usona episkopa konferenco (el ĝia proklamo en Washington): „La decido pri fabrikado de neŭtrona bombo grave danĝerigas la esperon, ke armado estos ĉesigita. Male, ekestas ja eĉ demando, ĉu usonaj politikistoj tiamaniere ne forigas psikologiajn, politikajn kaj strategiajn barojn de la nuklea milito.“

Ĉeĥoslovakio. Kardinalo F. Tomášek, arkiepiskopo de ĉefurbo Praha (el lia proklamo de 6. 9. 1981): „Esprimante sopiron de la tuta homa familio, mi instigas ĉiujn homojn, precipe la registarojn de ŝtatoj: penu doni al mondokazaĵoj direkton, respondan al homa racio kaj digno“.

Prezidantaro de Unuiĝo de katolikaj pastroj „Pacem in terris“ (el proklamo de ĝia laborkunsido, 24. 8. 1981 en urbo Brno): „Ĉiuj homoj havas komunan devenon, el kio devas rezulti, ke inter ili ne regu timo, sed amo. Kaj amo manifestiĝas en honesta, multflanka kunlaboro, el kiu ekestos multe da bono.“

Italio. Itala pastro P. Giuseppe de Rosa (el lia artikolo en itala gazeto Curriere della Sera): „La decido de Usono fabriki neŭtronan bombon kaŭzas novan, febran armadon, kiu de kristana vidpunkto estas peko kontraŭ Kreinto, ĉar ĝi kondukas al morto. Krome: ĝi postulas enormajn elspezojn, kiujn — dum reganta malsato en la mondo — ne eblas morale pledi.“

La kardinalo Giuseppe Siri el Ĉenovo (el lia prediko okaze de jubileo de loka katedralo): „La mondo alproksimiĝas al io terura. Sufiĉas, ke unu frenezulo milite misuzu la scienc-teknikajn inventojn kaj okazos mondkatastrofo. Malebligis tiun ĉi eblon estas la plej urĝe solvenda nuntempa problemo.“

Hungario. La ekumena konsilantaro de hungaraj eklezioj: „Haltigu ĉiujn preparojn por nuklea katastrofo, ne peku kontraŭ la krea intenco de Dio!“

Aŭstrio. Episkopo de Linz, Alois Wagner, prezidanto de la aŭstria katolika komisiono por justeco kaj paco: „Motivado de la neŭtrona bom-

zemplo estas la prezidenteco de Carter mem. Dum sia kvarjara mandato li faris ĉion eblan por gajni la konfidon de la plej agresemaj usonaj militaristoj. Li fariĝis ilia plej humila servisto.

Carter iniciatis la rezignon de la ratifiko de SALT-2, la strebon al supereco en la armado, la nedeziron gvidi traktadon kun Sovetunio pri novaj limigoj de la plej danĝeraj amasmortigaj armiloj, la instalon en Okcidenta Eŭropo de „eŭro-raketoj“. Tio signifis subfoson de la strategia ekvilibro en la armado kaj novan ciklon de vetarmado. Tiu vojo kondukas al minaco por Usono mem, ke la senbrida vetarmado, kiu ĉiam pli kaj pli elglitos el kontrolo, transformiĝos al bumerango direktiĝanta al tiu sama Usono kiu provokis ĝin. . .

Antaŭ pli ol kvar jaroj Carter promesis antaŭ

la televidaj spektantoj, ke li faros ĉion eblan, por ke Usono ĉesu esti „armita tendaro, sen amikoj, kaŝiĝinta malantaŭ alta barilo de timo rilate la ceteran mondon“ kaj ke li „likvidos la minacon lige kun la atomarmilo“. Tio estis vortpromeso de tiu sama Carter, transforminta Usonon en plej grandan komerciston de armiloj, eksportintan al Eŭropo la doktrinon pri „limigita nuklea milito“.

La aktuala mastro de la Blanka domo Ronald Reagan daŭrigas tiun ĉi politikon kun duobla energio. Sed kiam la eksa prezidento kritikas la aktualan, li samtempe fakte konfesas la senperspektivecon de sia propra gvidlinio. Samtempe — kaj tio estas pli grava — li aŭtoritate atestas pri la danĝero de ĝia daŭrigo.

S. Beglov

bo estas stranga: ĝi ne tro neniigas materiajn valorojn, sed simple pereigas homojn. La vivo estas ja plej granda valoro, tial la decido pri fabrikado de la neŭtrona bombo absolute kontraŭstaras la maksimumojn de la katolika eklezio. Ĝi estas febro de frenezuloj, neĝusta uzo de mono, produktata per pena homa laboro, kaj malurĝigas helpon por evolulandoj.“

Germana D. R. La prezidantaro de la Berlina konferenco de eŭropaj katolikoj (el proklamo dum la internacia renkontiĝo de katolikaj ĵurnalistoj, 10—12. 9. 1981 en Berlino): „Konkurado en armado estas peko kontraŭ Dio-Kreinto, ĉar tiamaniere oni kalkulas sur pereigo de la Dia kreitaro. Nia sankta devo estas gardi la vivon kaj defendi la elementan homan rajton: vivon en paco. Ni postulas tujan komencon de porpacaj traktadoj kaj samtempan ĉesigon de vetarmado, kiel esprimon de ĉies bona volo. Ni pretas kunlabori kun ĉiuj bonvolaj homoj, ĉar nur komuna strebado povas malebligi militon. Katolikoj, laborantoj en preso eldonado kaj aliaj amaskomunikiloj, intensigu la laboron por disvastigo de porpacaj ideoj kaj instigoj.“

Nederlando. La nederlanda Packomitato de eklezioj eldonis alvokon por okazigi porpacan manifestacion en Bonn la 10. 10. 1981 sub devizo: „Kontraŭ nuklea minacado — por malarmado kaj forigado de streĉiĝo. „Plua porpaca aktivado estas preparata por la „Pacsemajno“, okazonta de 15—21. 11. 1981.“

FR Germanio. Pli ol 390 reprezentantoj de porpacaj kaj religiaj organizaĵoj en FR Germanio subskribis alvokon de la nederlanda Packomitato de eklezioj por aranĝi la 10. 10. 1981 en Bonn porpacan manifestacion.

Pastro Ludwig Wild (dum porpaca demonstraĵo en Munkeno): „Ni ne allasos trompi nin: tiamaniere oni preparas militon! Tial ni devas kontraŭstari hodiaŭ, ĉar morgaŭ povus esti jam malfrue!“

Okcidentgermana katolika pacmovado PAX CHRISTI (el ĝia proklamo): „Fabrikado de neŭtrona bombo estas grava minaco por ĉiuj esperoj pri limigo kaj kontrolo de armado.“ La ĝenerala sekretario de tiu ĉi pacmovado Reinhold Lehman: „Lokado de tiu ĉi armilo sur l'eŭropa teritorio ankoraŭ pli intensigus la febran armadon.“

La prezidanto de „Kristana paca servo“ P. Konrad Elsässer el Frankfurt a. M.: „Nuntempe necesas plifortigi reziston de porpacaj fortoj kontraŭ la neŭtrona bombo. Registaro de Usono devas esti devigita nuligi sian decidon pri ĝia fabrikado kaj rezigni la nunan politikon de pliakrigado de la internacia streĉiĝo.“

Junaj kristanoj en Dortmund fondis „porpacajn avertajn gardojn“ kaj demonstris antaŭ preĝejoj kontraŭ dislokado de usonaj raketoj en okcidenta Eŭropo.

La diakona frataro de la evangelia eklezio eldonis alvokon kontraŭ la freneza politiko de febra armado de NATO kaj manifeston „Vorto al pacproblemo“, instigantan la publikon fari ĉion kio certigas la pacon.

Britio. La britaj religiaj gazetoj ĉiam en pli granda nombro publikigas leterojn de legantoj kontraŭ fabrikado de nukleaj armiloj kaj kontraŭ nuklea milito, kiujn ili nuntempe amase ricevadas.

Mondo. La plenumkomitato de la Monda luterana unuiĝo: „Kristanoj devas kunlabori en porpaca strebado kun ĉiuj bonvolaj homoj, sendiference de iliaj religiaj aŭ mondkonceptaj diferencoj, cele trovi novan, justan, komunan bazon por harmonioplana tuthomara vivo en firme sekurigita tutmonda paco.“

Eŭropo. La estraro de la Kristana Packonferenco eldonis proklamon kontraŭ la decido de registaro de Usono fabriki neŭtronan bombon. Jen la esenco: „Hiroŝima kaj Nagasaki pravas, ke uzo de nukleaj armiloj minacas la vivon sur nia planedo. En la tago de la 36-a datreveno de l'atomeksplodo en Hiroŝima ŝtatprezidento de Usono anncis decidon de sia registaro produkti neŭtronan bombon, proklaminte samtempe, ke tiu ĉi povas esti dum kelkaj horoj aplikita en kiu ajn parto de l'mondo.“

La Kristana packonferenco, konsciante danĝeron por la tuta homaro, alvokas la registaron de Usono nuligi sian decidon pri fabrikado de la neŭtrona bombo kaj anstataŭ tio helpi por efektivigo de l'sopiro de la popoloj pri malarmado, sekureco kaj paco. Kristanoj en la tuta mondo, kunlabore kun ĉiuj homoj de bona volo, reagu je tiu ĉi minaco al la vivo en la mondo per ankoraŭ pli intensa aktiviĝo por paco, justeco kaj internacia kunlaboro.“

Argentino. La argentina episkopa konferenco en sia jarkunsido kategorie kritikis la rezultojn de kvinjara agado de l'armea hunto en la lando. Ĝi konstatis, ke malboneco, malamo, venĝemo, ja rekte krueleco superas justecon en enlandaj aferoj. Dum tiu ĉi jarkvino la sekurecaj korpusoj mortigis minimume 15 milojn da sindikataj laboristoj, profesoroj, studentoj, ĵurnalistoj kaj aliaj civitanoj, kiuj estis proklamitaj kiel „malaperintaj“. La episkopoj protestis kontraŭ la maljusta subpremado de la loĝantaro, espriminte zorgon pri sorto de „malaperantaj“ homoj.

Aŭstrio. Antaŭulo de la aŭstria katolika sociala akademio Herwig Büchele postulis dum la katolika tago en Graz, kiun partoprenis 70 miloj da kredantoj, principan malpermeson de eksporto de aŭstriaj armiloj en Argentinon, ĉar ĝia armea reĝimo uzas ilin kontraŭ la loĝantaro. Inter la 15 miloj da „malaperintaj“ homoj en Argentino estas socialistoj, kristanoj, eĉ senpartianoj.

Honduraso. La ĉefepiskopo de Tegucigalpy en Honduraso, Hector Santos, akcentis dum prediko en la loka katedralo neceson de strukturaj ŝanĝoj en la mezamerika socio. Li diris, ke elementa kaŭzo de la estanta krizo baziĝas en „pliprofundigado de la diferencoj inter riĉuloj kaj malriĉuloj, nejusta strukturo de posedrajto de la grundo, analfabeteco. Li menciis la antaŭnelongan studon de la mezamerikaj episkopoj pri tiu ĉi temo, akcentante, ke ĝuste en tiu ĉi socia krizo baziĝas fakta minaco al la paco.“

Nina Taras

GEPATROJ SUPERVIVIS
LA GEFILOJN

Mizeron semis por la hom'
milito — bomboj kaj fusiloj.
Solecon en malplena dom'
gepatroj trinkas sen gefiloj.

La domon ĉe arbara lim'
ne nur por si konstruis ili.
Murdita tamen la filin',
ne venis el milito filoj.

Gepatroj vivas, filoj ne. . .

Kaj kia tempo venis nun —
feliĉe vivu kaj laboru.

La bofilinoj junaj kun
genepoj kiel rozoj florus.

El fora urbo kiel gast'
bofilo kun filin' alvenus —
ne estus en la domo fast',
de ĝojo la pokaloj plenus.

Gepatroj vivas, filoj ne. . .
Gardeno — granda majbuked',
acer' susuras apud hato.

Leteroj venas iam, sed —
de adresantoj nekonataj.

Kaj tiuj voĉoj el poŝkest' —
por ili — voĉoj de l'infanoj;
gratulas pri la Maja fest'
kaj Venkotag', deziras sanon.

Gepatroj vivas, filoj ne. . .

Solecon el sopira tas'
gepatroj trinkas sen infanoj
Nun estus vivo. . .

Sed frakas'
de ĉiuj revoj, ĉiuj planoj.

Tradukis: Petro Geliauskas

Gloso

hato — — kabano, dometo

Jiří Kořínek

DANKO

Vi, kiuj longe antaŭ ni paŝadis,
vi, kiuj luktis por aferoj justaj,
por la progreso kaj hominda vivo,
por la ekzisto-rajto de l'nacio,
nacio eĉ malgranda kiel mia,
vi, oferintaj sangon kaj havaĵon,
vi, kiuj por libero longe fora
batalis brave, mortis eŝafode,
suferis en mizer' de koncentrejoj,
sur montoj falis kun fusil' enmane,
patrinoj niaj, kies dolĉa vorto
karezis belon de l'gepatra lingvo,
geavoj niaj, kiuj en fidelo
persistis tra la ŝtormoj de la tempo,
honeste vivis por ekzemplo nia,
kiuj por bono tuthomara luktis,
kaj inter ili la sennombraj vicoj
de la adeptoj de ideo nia,
luktantaj senripoze dum jardekoj
por komprenilo inter ĉiuj gentoj
per lingvo de la Bjalistoka filo,
vi ĉiuj kiuj luktas kontraŭ fio,
kontraŭ militoj, homa stult', malsanoj,
por ke pli bone fartu la teranoj
en paco kaj en justa sociordo,
sen timoj, sen perforto, sen sufero,
al vi, pli bona parto de l'homaro,
ĉi simplaj versoj estu kuraĝigo
kaj trans epokojn diru nian DANKON.

Kajsin Kuliev

LA TERO ESTAS UNU

(Fragmento)

La Tero estas unu, kaj ĉiu malfeliĉo
resonos kiel plago en ĉiu tera spaco.
En kiu ajn angulo la Tero ekskuigus,
ĝi ankaŭ tuj sub vi ektremus, ŝanceliĝus.
La Tero ja ne povas en fremda lando tremi,
kaj lasi sen ŝancelo patrujon vian foran.
Se brulus iu domo malantaŭ montpasejo —
eklaras ankaŭ viaj okuloj poro la fumo.
En tiu mond' la plagoj ja multas. Ni ne scias
al kiu en l'estonto la malfeliĉo venos.
Sed konas de l'malbono ni ĉiuj la kutimon,
ĝi serĉas tra la mondo oferojn kaj suferojn.
Mi konas bone ankaŭ l'amaron de la cindro
de la vilaĝoj pacaj en cindron transformitaj.

Tradukis: K. Istomin

Jiří Kořínek

NIGRA SPEGULO

Post horizonton falas steloj,
ĉirkaŭe tempo nigras nur,
homar' pelata kun anheloj
dronas en trompoj kaj kvereloj.
El ŝlim' ĉu savos sin futur'?

Sangruĝajn bildojn projekcias
denove mano de rankor',
vi junaj, ĉu vi ĝin konscias,
kien terглоbo rotacias
stirata mise al horor'?

Doloro, ploro, mortsonoro,
jen celoj de la vetarmad',
angoro, noktoj sen aŭroro,
kaj bomb' atoma, mortstertoro,
kuŝas sur alabisma pad'.
Ne povas ŝildi nin frenezo,
nek naft-avido aŭ bezon',
ni volas vivi sen ĉi pezo,
al vetarmado venu ĉeso,
por plitaŭgaj' necesas mon'!

Se oni surdas, do ni krii,
aŭdeblu ĝi post ocean':
vi ŝtat-stirantoj, bone sciu,
militon volas jam neniu,
damnon al ĉiu krima man'!
Ni, kiuj volas plu konstrui
kun homprudento kaj sagac',
ne celas murdi kaj detruai,
sed ankaŭ sklave ne genui,
sed home vivi kaj en pac'.

Glosoj

rankoro — — obstina malpardonemo,
venĝema resento.

hororo — terurigo

damno — kondamno al punoj de l'in-
fero

sep blankaj narcisoj

Rajna Konstantinova

Mi prenas por konsulto dikan malnovan vortaron. Ĝi mem malfermiĝis pro iu objekto troviĝanta inter la paĝoj. En celofana papero estas volvitaj sep flaviĝintaj, rompeblaj, jam diafanaj narcisoj. Iam ili estis blankaj. . . La mekanismo de la rememoroj ekfunkcias. . .

● Estis la severa militjaro 1944. Vespere la urbo dronis en mallumo, pro la nigra papero sur la fenestroj. Forta vento, malpura neĝo, senespero en la animoj. Timo katenis la homojn.

Malgaje mi pasigis la Novan Jaron. Venis la deka de januaro 1944. Io malbonaŭgura ŝvebis en la frosta aero. La homoj rapidis sur la stratoj kun levitaj kolumoj kaj zorgmienaj vizaĝoj — ni rigardis ilin tra la vitra pordo. En la bankon, kie mi laboris, iuj el ili eniris ekscititaj kaj anhelantaj, deponis aŭ retratis sumojn kaj rapide eliris. Regis granda streĉiteco. Je la 12a horo estis tagmeza paŭzo. Ni rapide surloke manĝetis ion. Subite la radio komencis disaŭdigi marŝojn kaj iajn kodajn vortojn. Aŭdiĝis minaca averta muĝado de alarmo. Laŭ la instrukcioj, ni rapide malfermis la fenestrojn, ŝlisis la dokumentojn en la feraj ŝrankegoj kaj kuris al la trezorejo, troviĝanta unu etaĝon sub la tero. Dum aŭdiĝis muĝado de grupo da aviadiloj — pezaj usonaj „fortikaĵoj“ — kaj furioza kontraŭaviadila kanonado, fajfado kaj eksplodado de kelktunaj bomboj. Por momento la muĝado de la bombaviadiloj eksilentis, por eksoni tuj per nova, pli granda forto. Eĉ en la trezorejo la planko kvazaŭ bolis kaj ŝokiĝis.

La signalo pri fino de la bombado aŭdiĝis post duonhoro, sed al mi ŝajnis, ke tiu tempospaco daŭris tutan eternecon. Ŝanceliĝante ni forlasis la kelon kaj eliris al la trotuaro. Kia terura bildo! Ĉirkaŭe — detruitaj domoj, el kiuj restis nur ferstangoj, brikoj, betonaj blokoj kaj pezaj flamoj eligantaj nigran fumon kaj fetoron. Sur la strato kuras virino, rigardas supren kaj freneze krias: „Paĉjo! Paĉjo! Pardonu min!“ Ankaŭ mi rigardas supren: el unu fenestro de la oka etaĝo vidiĝas arĝenthara kapo, ŝultroj kaj pendantaj brakoj de maljunulo, premegita de la ruinoj de la supraj etaĝoj. . . Fajfegas ambulancoj kaj aŭ-

toj. La tramoj ne moviĝas — difektiĝis la elektrocentralo. Ie ploregas infano, perdinta sian patrinon, henas vundita ĉevalo. Mi konsternite observas la ruinigitan straton. Kiom da klopodoj estis necesaj por konstrui kaj mebli la domojn, kiom da homaj espero kaj suferoj sin kaŝis sub iliaj tegmentoj. . . Tie kaj tie eĉ ankoraŭ briletis pitoreskaj kristarboj. . .

Iu forte puŝas min. Mi rekonsciiĝas kaj konstatas, ke mi ĉiam ankoraŭ premas enmane pecon de malfreŝa kringo, per kiu mi tagmanĝis. Malrapide, senesperigite, ni eniras denove la bankon por fini la komencitan laboron kaj iri hejmen por vidi, ĉu la hejmo restis. . . Dank'al dio! De malproksime mi vidas, ke la dombloko, en kiu mi loĝis kun kolegino, staras sur sia loko. Ni ambaŭ eniras la malvarman ĉambron, kiun ni ne povas hejti, ĉar mankas elektra kurento kaj akvo. Ni metas en malgrandaj valizetoj niajn dokumentojn kaj valoraĵojn, vespermanĝas per malvarmaj sandviĉoj kaj enlitiĝas vestite. Forta timo katenas niajn korojn.

Je noktomezo vekis nin muĝado kaj pafado kaj ia blanka lumo. En la aero pendis diverskoloraj „paraŝutetoj“. La urbo estis lumigita kiel dumtage. Ni kuris al la kelo. Ripetiĝis la dumtaga tragedio. . .

La sekvan tagon — la 11an de januaro 1944 — ni kolektiĝis en la banko palaj, nesatdormintaj. Kelkaj ne venis — ili pereis dum la nokta bombado. Iuj estis perdintaj siajn domojn. Ni, la „feliĉuloj“, kun kompto aŭskultis iliajn rakontojn. Pli granda grupo ĉirkaŭis mian amaton — Vasko. Nigra pro fumo kaj fulgo, vestita nur en piĝamo kaj pantofloj, li lace rakontis, ke dum la nokto, kiam li, lia patrino kaj lia fratino apenaŭ sukcesis malsuprenporti de la dua etaĝo la maljunan, preskaŭ paralizitan avinon, iu el tiuj perfidaj „paraŝutetoj“ falis kaj bruligis la teatrorokojn, deponitajn en la korto. La elirejo estis blokita. Kun grandaj fortostreĉoj ili sukcesis transsalti la dumetran brikan muron, utiligante lignan ŝtuparon, apenaŭ portante la avinon. Kiam ili atingis la straton, ilia domo jam brulis ĉirkaŭita de sibilantaj fajroj. Ĉirkaŭe fajfis kaj eksplodis bomboj. Ili piedmarŝis ĝis la stacidomo. La perono estis plenplena de timigitaj homoj. Li iel sukcesis envagonigi la tri virinojn, kiuj nun veturas al parencoj. Kaj li, jam senhejmulo, revenis en la bankon. . .

Mi kun profunda kompto aŭskultis tiun modestan, komplezeman homon, pretan sin oferi por la aliaj. . . Mi ploris ankaŭ pro mia perdita feliĉo. . . Ja ni intencis dum la printempo geedziĝi. . . Ĉu ni ĝisvivos tion? — mi pensis. . . Oni donis al li kuponon por ŝuoj kaj kostumo kaj antaŭpagon kontraŭ la salajro. En piĝamo kaj pantofloj li iris al la proksima konfekcia magazeno. Neniu miris pro lia neordinara vestaĵo. En tiu frosta mateno ne nur li iris sur la strato en piĝamo. . .

Ankaŭ mia loĝejo estis detruita la 16an de marto. Sekvis bombadoj la 29an kaj la 30an de marto 1944.

La lan de majo 1944 li devis festi sian 27an naskiĝtagon. Ni decidis deegziĝi je tiu dato. La direktoro de la banko, afabla kaj komplezema homo, disponigis al ni kaj al la gekolegoj-senhejmuloj sian vilaon en la proksima vilaĝo Knjaĵevo, kie devis okazi la „bankedo“. La aliaj iris pli frue por prepari ĉion necesan. Mi kaj mia amato marŝis malrapide, man-en-mane, inter la tristaj arboj, kies floroj estis difektitaj de la abunda neĝo, falinta dum aprilo. Post la neordinare longa kaj malvarma vintro, la printempo ankoraŭ hezitis veni. Ni mallauĉe interparolis pri nia estonteco, kiu aspektis senesperiga.

Malantaŭ ni ĝemis kaj fumis la korvundita ĉefurbo.

Kontraŭ ni marŝis etpaŝe kurbiĝinta, nigre vestita maljunulino. Nigra kaptuko preskaŭ kovris ŝiajn okulojn. Si portis sur sia fleksita kubuto grandan korbon, kovritan per blanka tuko. Kiam ŝi paraleliĝis al ni, ni ambaŭ, kvazaŭ anticipe interkonsentinte, unuvoĉe diris: „Bonan matenon, avinjo!“

Si surprizite ekhaltis, levis la kapon, sur ŝia falto-kaj zorgoplena vizaĝo eklumis varma rideto kaj ŝi respondis: „Dio kun vi, infanoj! El kie vi estas?“ — „El Sofio. Hodiaŭ ni geedziĝos.“ „Dio benu vin, infanoj! Estu sanaj kaj feliĉaj!“ Kaj, demetinte la blankan tukon de sur la korbo, ŝi deprenis sep freŝajn blankajn narcisojn, sur kiuj, simile al diamantoj, brilis pluvgutetoj. Si etendis la brakon kun la narcisoj al mi. „Nur tion mi havas, filino mia. Mi elkore donacas la florojn al vi. Ili alportu al vi feliĉon!“

Mi prenis la karan donacon kaj kisis ŝian sulkoplenan manon. Ho, kiom longe mi ne plu estis vidinta freŝajn florojn! . . . Ili ekbrilis kiel la espero mem. Mi diris: „Avineto mia, mi multe, multe dankas vin. Mi gardos tiujn ĉi florojn dum mia tuta vivo!“ „Dio helpu, dio helpu, infano mia! Se la malbenita milito baldaŭ finiĝos, ĉio fariĝos pli bona. Nu, iru en bona kaj sana stato!“ Kaj ŝi ekrapidis etpaŝe al la bazaro, apogante sin sur sia bastoneto.

● Miaj fingroj karesas la sekajn, jam 38-jarajn, florojn. En tiuj foraj tagoj, kiam sur la ĉielo flugis ne belkantaj birdoj, sed grandegaj gruntantaj monstroj, ŝutantaj fajron kaj morton; kiam estis nek decaj vestoj, nek sufiĉa manĝaĵo — tiuj sep blankaj narcisoj ekbrilis kaj inspiris en niajn animojn kuraĝon kaj esperon ke la vivo fariĝos pli bela (kia ĝi efektive fariĝis). Ili inspiris ankaŭ firman decidon gardi la pacon, kiu helpos al ni reakiri ĉion kion ni perdis dum la milito! La sep blankaj narcisoj restis simbolo por nia tuta vivo. Depost tiam ĉiujare la Unuan de Majo mia edzo donacas al mi sep blankajn narcisojn, sed mi gardas nur tiujn — la unuajn. . .



A. Jonesov

Ni estas internaciistoj.

Al la Samarkand-a klubo de internacia klubo „Esperanto“ venis letero el la belga urbo Maasmehelen.

„Karaj kamaradoj! La 9-an de decembro ni partoprenis en granda internacia protesta demonstracio kontraŭ la planoj de NATO pri produktado kaj dislokado de usonaj nukleo-raketoj en Okcidenta Eŭropo. La laboruloj en la tuta mondo ne plu volas paciĝi kun tio kaj ĉiam pli kaj pli ofte efektiviĝas tiajn demonstraciojn. La kapitalistoj nin nomas ordinaraj homoj, kaj la ordinaraj homoj ne volas militon, ili volas esti amikoj kun la popoloj de la tuta mondo. Kaj tiaj homoj estas multegaj. Ni kredas, ke la homaro povas eviti novan militon, sed tiucele oni devas fortikigi la solidarecon kun la laborantoj el la tuta mondo. Ni scias, ke Sovet-Unio faras ĉion eblan por konservi la pacon. La komunikiloj por amasinformado en Belgio, same kiel en aliaj kapitalismaj landoj, konstante disvastigas mensogojn pri USSR. Antaŭ nelonge ni organizis ekspozicion de afiŝoj kaj libroj pri Sovet-Unio. Tiu ekspozicio rakontas la veron pri via lando, pri la grandiozaj atingoj de la soveta popolo. . .“*

Tiun leteron sendis la belga minlaboristo Franc. Zvar. Ĝi estas resono de publikaĵo en internacia revuo de l'esperantistoj, de alvoko de la membroj de Samarkanda Klubo de l'Internacia Amikeco „Esperanto“, ke oni sendu al ili materialojn pri la ekspozicio, kiu rakontas pri la batalo por paco en la diversaj landoj. En sia letero la belgo enmetis fotokopiojn de afiŝoj kaj protestalvokoj kontraŭ la vetarmado. Franc Zvar rakontis ankaŭ pri la tago memore al la sovetaĵ soldatoj pereintaj sur belga tero en la dua mondmilito — tago, kiu okazis en tiu urbo.

Tradukis: As. Grigorov

NATO — Organizo de la Nord-Atlantika Kontrakto (Red.)

PETRO POLIŜĈUK

Multaj esperantistoj en la mondo konas la energian kaj relacigeblan sovetan esperantiston Petro Poliŝĉuk. Kvankam pli ol sepdekjara, li plene konservis sian junulan petolemon, sian inklinon esprimi en strofoj la propran pozicion pri gravaj aktualaj problemoj. En dissemitaj tra la gazetaro versoj li verve difinis sian kredon je la fortoj de la progresema homaro, sian amon kaj sindonemon al la justa afero de l'Paco, sian malamegon al la militaristoj, preparantaj novan militon.

La ĉarma amiko kun ŝprucantaj sinceraj sentoj, la brava defendanto de sia patrolando kontraŭ la „bruna pesto“, la esperantisto kun duonjarcenta esperantista agado, longjara prezidanto de la Esperanto-komisiono de Uzbeka societo por amikeco kaj kulturaj ligoj kun eksterlando, la ĉarma kaj ĉiam ridetanta „ĉiĉerono“ de ĉiuj esperantistoj vizitintaj Taŝkenton, Petro Poliŝĉuk lasis nin funebri pro lia neatendita forpaso.

Ni sekvu lian ekzemplon de senkompromisa pacbatalanto, arda adepto de amikeco inter la popoloj, sindona kaj sinoferema aganto!

ZAMENHOF PRI LA INTERNACILINGVA IDEO

Canko Murgin

La ideo pri starigo de planlingvo en la sfero de la internaciaj kaj interŝtataj rilatoj estas tre malnova. El scienca-filozofia vidpunkto ĝin unue formulis la elstara franca filozofo-matematikisto Rene Dekart, kiu antaŭ iom pli ol 350 jaroj (en nov. 1629) surpaperigis, dum siaj memvolaj ekzilo kaj izolo en Nederlando, ke oni povus eltrovi sciencon, starigontan la principojn de tiu lingvo, Krom tio, R. Dekart prognozis, ke la internacia planlingvo estos tre facila kaj rapide lernebla. Ĝi estos tiom klara kaj esprimova, ke eĉ la kamparanoj, sen granda peno, povos juĝi pri malfacilaj kaj komplikaj problemoj pli bone ol tion faris tiutempe la eruditaj filozofoj.

Por realigi tiun ĉi ideon sin dediĉis kelkcentoj da fakuloj kaj amatoroj. Kaj post 250-jara klopodo aperis sur la horizonto Volapuko, la lingvo de J. M. Schleyer (en 1879—1880), kiu pruvis, ke la internacilingva ideo estas realigebla.

Kelkajn jarojn poste aperis la Lingvo Internacia (1887) kaj la E-movado, ambaŭ iniciatitaj de L. Zamenhof. Pro kvalita supereco de Esperanto kiel planlingvo, tiu venkis ne nur Volapukon, sed ankaŭ kelkdekojn da aliaj novaj projektoj pri internacia lingvo: la iamaj tro pretendemaj planlingvoj Ido de Couturat (1907) kaj Occidental (Interlingue de E. de Wal jam ĉesis spiri spite al siaj enormaj pretendoj). Nun apenaŭ vegetas fakte nur unu miniatura konkuranto kontraŭ Esperanto en la batalo por unu internacia planlingvo sur la monda tereno. Ĝi estas la Interlingua de Al. Gode. En sia tridekjara ekzisto (ekde 1951) ĝi varbis en sia kulmino antaŭ kelkaj jaroj preskaŭ 200 adeptojn en la tuta mondo kaj nun tiu nombro sinkis al 120. Mi komentos nek la staton de Interlingua, nek ties atributojn. Mi tamen ŝatus memorigi, ke nur en Bulgario Esperanto varbis pli ol 500 fervorajn subtenantojn en daŭro sole de 15 jaroj (1888—1903).

En la komencaj jaroj de Esperanto (1887—1895) L. Zamenhof dediĉis scipovon kaj monon por realigo de sia plej dorlotita primara revo: la internacilingva ideo. En lia tiutempa aktivado dominis la poresperanta agado, per kiu li majstre konstruadis la planlingvan ponton inter nacioj kaj ŝtatoj. Tiam L. Zamenhof verkis kaj tradukadis, redaktis kaj eldonadis, varbis kaj vastigadis... Menciindaj estas liaj antaŭparoloj de lernolibroj kaj vortaroj, organizaj gazetartikoloj, poemoj (La vojo, Al la fratoj k. a.).

En tiu rilato la aŭtoro de Esperanto akcentis kun danko ĉies kontribuon por la komune homa strebado. L. Zamenhof kaj la unuaj pioniroj de la E-movado laboris kun tia persisto kaj ardo, ke eĉ la financa baraktado ne sukcesis ilin haltigi. En majo 1890 Christian Schmid, prezidanto de la Nurenberga „Mondlingva Klubo“ kaj

eldonanto de la internacia presorgano „La Esperantisto“ anoncis ĉesigon de tiu gazeto, eĉ antaŭ la fino de la komencita jarkolekto unua. Tiam L. Zamenhof pluportis la torĉon. Krom redaktoro li fariĝis ankaŭ eldonanto de tiu sama gazeto. Kun granda monperdo kaj enorma peno L. Zamenhof subtenis ĝin ĝis la fino de la jarkolekto dua, eldoninte entute 15 numerojn (1890—1891) kaj siaflanke deklaris ĉesigon de la presorgano.

Aperis nova stafeto — la germana esperantisto W. H. Trompeter, kiu deklaris pretecon ne nur plu eldoni la gazeton, sed ankaŭ garantii modestan salajron de 100 markoj monate al la redaktoro (L. Zamenhof). Post tri jaroj (1892—1894) li retiris sian garantion pri aperigo de „La Esperantisto“. Oni supozas, ke W. H. Trompeter forlasis la eldonistan postenon pro fiasko de la provo enkonduki reformojn en Esperanton dum la krizo en la somero de 1894. Komence de 1895 L. Zamenhof duan fojon reprenis sur sin la ŝarĝon eldoni la internacian E-gazeton. Li estis ne nur iniciatoro de la lingvo Esperanto, sed ankaŭ redaktoro, kaj unu el ĉiuj tri eldonistoj de la tiama unusola E-gazeto en la mondo. L. Zamenhof eldonis ankoraŭ ses numerojn por januaro-junio 1895. Tamen la rusaj abonantoj ricevis nur la januaran numeron. La ceteraj ne estis enlasitaj en Rusion (la gazeto aperadis eksterlande) fare de la carisma cenzuro.

Tio okazis, ĉar en la februara numero (1895) de „Esperantisto“ aperis tri danĝeraj materialoj por la carismo: (1) „Kredo kaj Prudento“, verko de L. N. Tolstoj; (2) artikolo pri starigo de kunlaboro inter la esperantistoj kaj tolstojanoj — en la personeco de eldonfirmao „Peranto“ („Posrednik“) kaj (3) novaĵeto el Nederlando pri la spektado de malriĉuloj kontraŭ pagado de ŝtatimpostoj.

Tiam en Rusio loĝis pli ol 65% de „La Esperantisto“-abonantoj. Sen ili la gazeto ne plu povis ekzisti. Tiu mortiga frapego kontraŭ la esperantistan presorganon fakte estis pli ol sango-verŝa pogromo kontraŭ la internacilingvajn ideon kaj movadon en Rusio.

Tamen L. Zamenhof ne restis senfara. Post ĉesigo de la E-gazeto li provis apliki aliajn manierojn por varbi adeptojn al la internacilingva ideo. En la fino de 1895 L. Zamenhof verkis en rusa lingvo la faman broŝureton „Mallongaj informoj pri la internacia lingvo Esperanto“, kiu poste estis eldonita ankaŭ en deko da aliaj lingvoj. En Bulgario ekzemple ĝi aperis en du broŝurformaj eldonoj dum unu jaro (1899). Ĝi fariĝis tiutempe plej efika kaj plej malmultekosta varbilo en monda skalo. Ne hazarde oni ĝin kromnomis „mejloŝtono el broŝureto“². Sed la apogeon

n la batalo por popularigo de unu planlingvo en a internaciaj kaj interŝtataj rilatoj L. Zamenhof atingis per la traktaĵo „Esenco kaj estonteco de la internacia lingvo“ (1900).

Dum tiuj obstakloplenaj jaroj L. Zamenhof laboregis sindone kaj finance preskaŭ bankrotis, tamen en la komenco de la kuranta jarcento li ne sen ĝojo povis konstati, ke Esperanto kaj la internacia E-movado profunde enradikiĝis en la socion kaj daŭre progresas ne plu dependante eĉ de liaj propraj subteno kaj partopreno. Tiam L. Zamenhof konsideris netuŝebla la instrukcion en la Unua Libro (1887), ke Esperanto ne devas en-trudiĝi en la „doman vivon de la popoloj“³, kion li emfazis ankaŭ en „Esenco kaj estonteco...“ (1900) nome, ke Esperanto „neniel intencas en-miksiĝi en la internan vivon de la popoloj“¹. Tio signifas, laŭ li, ke enkonduko de planlingvo en la internacian kaj interŝtatan sferon neniom modifos la internan strukturon de la apartaj nacioj, sed nur celas krei favorajn cirkonstancojn por plifaciligi ties eksterajn rilatojn.

La agado de L. Zamenhof por realigo de la internacilingva ideo per disponigo de unu planlingvo por uzado en la internacia vivo estas ĉef-fadeno en la historio de la E-movado. Pro tiu ideo L. Zamenhof entuziasmiĝis, salutante la kongresanojn (1905), kiuj „kunvenis... por fra-te premi al si reciproke la manojn pro la nomo de granda ideo, kiu ĉiujn nin ligas“⁹. En letero (13. IX. 1907) al Majoro Lemaire L. Zamenhof admonas: „La mondo ne akceptas nian aferon ne pro tiaj aŭ aliaj detaloj (kiujn ĝi tute ne konas), sed ĉar ĝenerale ĝi estas in-diferenta aŭ malamika kontraŭ nia ideo“¹⁰. Dum ja jubilea E-kongreso en Krakovo (1912) antaŭ ol forlasi la respondecan postenon de gvi-danto en la E-movado, li trafe atentigis la espe-rantistojn: „Ne forgesu, ke Esperanto ne estas sole simpla lingvo, kiun ĉiu el ni uzas nur por siaj propraj bezonoj, sed ke ĝi estas grava socia problemo, ke por atingi nian celon, ni devas kon-stante propagandi nian aferon kaj zorgi pri tio, ke la mondo havu estimon kaj konfidon por ĝi“¹¹.

Kvankam en 1912 L. Zamenhof konstatas, ke la Lingvo Internacia transiris al nova pli alta stadio de disvolvo, li energie asertas, ke konti-nue estas necesaj ne malpli da klopodoj: „Espe-ranto jam ne plu dependas de iu sola homo, nek de iu sola aro da homoj por sia sukceso. Homoj povas veni, homoj povas iri, sed Esperanto daŭ-rigos ĝis la idealo pri la lingvo internacia... estos atinginta sian venkan realiĝon por la bono de la tuta homaro“¹².

Ankaŭ post la morto de L. Zamenhof la batalo por la ideo de lingvo internacia daŭre restas gra-va. Tion montras Th. Cart en sia raporto dum la XXII-a UK de Esperanto (1930): „La mondo, precipe la lingvistoj, dubas pri la ebleco de la internacia lingvo; ni devas montri al ili, ke ĝi jam ekzistas. Do ni propagandu kaj uzu Esperaton!“¹³. Tiu tasko ankaŭ nun estas ankoraŭ aktuala kaj ĝi restos tia ĝis la enkonduko de iu planlingvo en la sferon de internaciaj kaj in-

terŝtataj rilatoj fare de la plej altaj ŝtatinstan-coj kaj de la organizoj agentaj sur la interna-cia tereno.

La internacilingva ideo estas tre ĝenerala, ko-munehoma, superklasa. Ĝi estas efektiva ligilo inter ĉiuspecaj kaj diverstendencaj esperantistoj. Tamen kiel tuthoma bono tiun ideon tre fervore kaj entuziasme subtenas plejparte la progresemaj esperantistoj, kiuj certe interesiĝas ne nur pri solvo de la internacilingva problemo, sed — an-kaŭ pri rekonstruo de la soci-ekonomia strukturo por krei eblecon pri vivo, digna, sen ekspluatado de homo kontraŭ homo kaj por starigi novtipajn rilatojn inter la homoj, nacioj kaj ŝtatoj.

BIBLIOGRAFIO

1. Bulgara Esperantisto, n-ro 12, 1979, Sofio, p. 15—16.
2. Paco, n-ro 4, 1979, Sofio, p. 12—13.
3. D-ro Esperanto (L. Zamenhof): Lingvo Internacia. Antaŭparolo kaj Plena Lernolibro (por rusoj), Varsovio, 1887, Fotorepresa eldono, Helsinko, 1948, p. 23.
4. Jon. Dietterle (red.): Originala Verkaro de L. L. Zam-hof, Leipzig, 1929, p. 281.
5. I. Lapenna: Ĉu universala aŭ helpa lingvo?, Esperan-to, jk. 50, n-ro 624, (11), 1957, p. 161—162.
6. L. L. Zamenhof: Fundamento de Esperanto, Mar-mande, 1963, Francio, p. 33.
7. I. Lapenna: Festparolado al 41-a UK de Esperanto (en Kopenhago), Heroldo de Esperanto, n-ro 12 (1236), de aŭg. 1956, p. 2.
8. Esperanto, n-ro 278 (10), 1923, p. 191 (15).
9. Noto 4, p. 363
10. G. Waringhien (red.): Leteroj de L. L. Zamenhof, Vol. II, Paris, 1948, p. 36.
11. Noto 4, p. 410.
12. Same, p. 412.
13. Heroldo de Esperanto, n-ro 34 (582), de aŭg. 1930.

KARANDAS

KONSILIO PRI NUKLEA PLANADO



— Do, konsentite!



Violin Oljanov

Kontraŭ komplikadon de Esperanto

La Plena Analiza Gramatiko de Esperanto estas rekonita kiel ĉefverko de la esperantologia literaturo. Jam por kelkaj generacioj la Plena Gramatiko prezentis ĉeman libron, konstantan konsultilon. Ĝia unua apero en 1935 signis meiloŝtonon en la evoluo de la lingvo kaj de la Esperanto-movado. Ke ĝi estiĝis baza verko pri la strukturo de la Internacia Lingvo montras la fakto de ties kvara eldono.

En ĉiu nova eldono la aŭtoroj sumigis la novaĵojn de la lingva praktiko post la antaŭa eldono kaj pliiĝustigis formulojn kaj la poziciojn.

Nun ĝia titolo estas kompletigita per la epiteto „analiza“*. Per tiu aldono refoje emfaziĝas ĝia funkcio ne de leĝfaranto, sed de konstato de la uzado, analizanto kaj sumiganto de la lingva praktiko. Nome analizante la lingvouzon fare de elstaraj Esperanto-aŭtoroj kaj tradukistoj PAGE sintezas la uzadon de la formoj kaj la strukturaj elementoj kaj deduktas la regulojn de la gramatiko, strebante ne deflankiĝi de la 16 reguloj — principoj de Zamenhof kaj de la Fundamento. Nu, en kelkaj lokoj la aŭtoroj faras proponojn por uzo de formoj, iuj el ili novaj, iuj eĉ ne konvenaj (kaj ne akceptataj!), sed tio ne ŝanĝas la analizan karakteron de la libro kaj la ĝeneralan deduktecon de la proponataj solvoj.

Diference de la III-a eldono nun PAGE aperas kompleta, en unu volumo entenanta 599 paĝojn aŭ, se ni ne enkalkulas la indeksojn kaj la enhavtabelon, 528. En tiu ĉi amplekso enestas ĉiuj bazaj dividoj de gramatiko: fonetiko, morfologio, sintakso, leksiko (vortfarado). En PAGE oni faras iom diferencon dividon.

La unua parto estas titolita „La vorto“. Al ĝi apartenas la fakoj: (a) Crtografio kaj interpunkcio; (b) Fonetiko; (c) Morfologio kaj sinetio.

Al la dua parto — „La frazo“ apartenas: (a) Vortsintakso; (b) Propozicio-sintakso; (c) Frazsintakso.

En „La vortfarado“ diskutiĝas: (a) La vortkonsisto de la lingvo; (b) La kunmetado; (c) La derivado; (d) Kritiko de la Esperanta vortfarado.

Tiu ĉi revuo de la dividoj kaj subdividoj montras konformecon de la titola epiteto „plena“. Sed ne nur tio. En la verko ne estas preterlasitaj detaloj de la lingvouzo, kiujn prezentas la vivo, kiel reflekto de la senlima nuancado de la homa penso. Ĉiu esperantisto strebanta al perfektigo povas trovi en PAGE respondon al hezitigaj demandoj. Preskaŭ ĉiuj stumblaj lokoj en la lingvouzo trovis sian konvenan lokon.

Tiaj konkretaj demandetoj estas ekzemple: la uzo de infinitivo post „ordoni“, „sendi“, „lasi“; la uzo de absolut-infinitiva propozicio, la verboformo post „timi“ ktp. Tre bone klarigita estas la rilato de la participa tempo al la tempo de „esti“ kaj speciale la perfekteco. Eĉ tre

* K. Kalocsay, G. Waringhien. *Plena Analiza Gramatiko de Esperanto*. Kvara, tralaborita, eldono. UEA, Rotterdam 1980.

** La cifero post la oblikva streketo montras la paĝon.

bona esperantisto povas multon novan lerni el la vortfarada parto, el la propozicia-sintakso, la vortsintakso kaj el la tuta libro. Ĝi prezentas veran trezorejon, el kiu oni povas ĉiam ĉerpi por kontinua perfektigo aŭ por okaza konsulto, por trovo aŭ kontrolo de konkreta formo dum verkado aŭ tradukado. Pro tio prave oni povas ĝin nomi baza prilingva verko de Esperanto.

Bedaŭrinde en PAGE estas allasitaj pluraj mankoj, malperfektaĵoj, eĉ eraroj, kiuj limigas iagrade ĝian praktikan valoron kaj la influon sur la amason da esperantistoj.

Ni komencu per la terminaro. Parto de ĝi estas elpensita de la aŭtoroj de la gramatiko, kaj kelkaj terminoj estas tute artefaritaj kaj sonas volapukece. Kial ekzemple ni uzu la neologismon „adjekto“, se ekzistas natura, uzata en pluraj lingvoj kaj konsistanta el fundamentaj vortoj termino „cirkonstanca komplemento“? Dum „adjekto“ nenion diras al la lernantoj, „cirkonstanca komplemento“ tuj malkovras la esencon de la frazelemento, nome, komplemento, kiu montras la cirkonstancon, ĉe kiu efektiviĝas la ago, aŭ la stato. La argumento pri koncizeco ne estas konvinka. Ni scias el la historio de Volapuko, ke ne ĉiam la mallongeco de la vortoj faras ilin pli facile memoreblaj kaj kompreneblaj.

PAGE nomas „objekto“ la objektan komplementon. Tiu ĉi pli mallongan formon ni povus uzi en la praktiko, tamen kiam oni konigas al la legantoj (lernantoj) novan bazan nocion, oni devas ĝin prezenti en la plena, scienca formo. Des pli, la vorto „objekto“ estas plursignifa kaj povas rezultigi miskomprenon.

Estas interese, ke PAGE nomas komplementojn ĉiujn frazelementojn, krom la predikato kaj la subjekto! Tamen, poste, kiam preciziĝas la nomoj de la konkretaj partoj, oni forlasas tiun terminon kaj anstataŭigas ĝin per elpensitaj, neoficialaj. Sed la nekonsekvenco ne haltas en tiu ĉi punkto — ĉi tie kaj tie oni nomas ilin suplementoj. Per la sama nomo ja estas difinita speco de la epiteto! Por la lastaj oni enŝovas: „akcesoraj komplementoj“. Tia malkonsekvenco en la uzo de la terminoj estas malutila, embarasa. Pri tia mikso de terminoj mi parolos iom plue.

La aŭtoroj trovis akcepteblan terminon „prepozitivo“ por esprimi vorton kun prepozicio. Sed kial „prepozitiv-prepozitivo“?! Tio ja estas prepozitivo plus prepozicio. Do, pli ĝusta nomo estus „prepozici-prepozitivo“ aŭ pli klare — „prepozitivo kun prepozicio“, aŭ plej bone — „vorto kun du prepozicioj“.

Subite en § 358/472** oni uzas „predikata atributo“, anst. „predikativo“.

Eĉ tiuj kelkaj ekzemploj indikas, ke la aŭtoroj ne observas sian principon, ke „en la gramatiko, tiel same kiel en ĉiu alia scienca terminaro oni povas atingi klarecon nur per ekzakta kaj logika difinado.“

Sed la sekvaj konkretaj ekzemploj pruvas, ke la aŭtoroj de PAGE grave neglektas la klarecon miksante terminojn kaj gramatikajn kategoriojn. Mi montros nur iujn sinsekve laŭ paragrafoj kaj paĝoj.

§ 9/30. „Oni elektis lin kiel prezidanton“ — estas nomita elipsa frazo. En postaj paragrafoj (175, 197) oni neas, ke tiaj frazoj estas elipsaj (eĉ estas prezentita la sama ekzemplo!)

§ 93/130. „... ĉu ĝi rolas kiel predikato aŭ kiel substantivo aŭ kiel adjektivo“. Miksiĝas sintaksaj kaj morfologiaj kategorioj.

§ 95/131. Oni parolas foje pri „akcesoraj“ tempoj, foje pri „rilataj“.

§ 105/140. „Li konatiĝis kun sia estonta edzino.“ En tiu ĉi propozicio la cirkonstanca komplemento (adjekto) „edzino“ estas nomita „suplemento“.

§ 119/163. „Subjekto“ anstataŭ „plenumanto de la ago“. Tio povus erarigi la legantojn miksante la faktan plenumanton kun gramatika subjekto de la propozicio.

§ 119/165. „Al-adjekto“ anst. „nerekta objekto“ (pagigi al iu monon).

§ 169/232. En la propozicio „pli bone estus esti nenaskita“ oni nomas la infinitivon „esti“ infinitiva komplemento; ĝi fakte estas **subjekto**.

§ 179/245. Titolita „ablativa objekto“ (kiel vi vidas —

abunda produktado de terminoj!) kaj post la difino sekvas la frazo: „Tiun objekton tamen pli ĝuste estas rigardi ablativa adjekto“ (?!). Estas necesa strikta determino kaj disdivido de la gramatikaj kategorioj. Ne povas esti tio, kaj samtempe — alio.

§ 197/269. „Li havis nur la pugnojn kiel armilojn“. Malfacile oni povus akcepti, ke la cirkonst. kompl. post „kiel“ estas predikativo.

§ 200/273. „Oni povas uzi anstataŭ stat-adjekto ankaŭ adverbon“ — denove mikso de sintaksa kategorio kun morfologia (adverbo)!

§ 204/274. Mikso de rezultaj adjektoj kaj predikativoj.

§ 233/312. „Mi vidis lin ŝteli“. Oni asertas, ke „oni povas tiajn formojn anstataŭigi ankaŭ per objekta pr-vo“. Sed ja la infinitivo estas ankaŭ objekta pr-vo!

§ 257/333. Stranga miksiĝo de diversspecaj subprop-oj.

§ 399/493. „Specialaĵo de pri- estas, ke ĝi, kiel prefiksoido respondas ne nur al la prepozicio pri, sed al ĉiuj prepozicioj, kiuj formas nerektajn objektojn (demovaj: de el [ĉu nerektaj objektoj?! — notoj miaj; almovaj: al, por). Tiujn nerektajn objektojn ni nomas ankaŭ adjektoj koncernaj, . . .“ Fakte post demovaj de, el sekvas lok-adjektoj movaj (§190)!?

§ 17/39. Oni asertas, ke ĉar ŭ neniam formas apartan silabon, tial povas troviĝi nur post vokalo. Sed apartan silabon neniu konsonanto formas. Ĉu la sama regulo validas ankaŭ pri ili?!

§ 59/84. „Kiuj estas tiuj paperoj? — Fakturoj.“ Tie ĉi pli ĝusta estus „kio“. Al „kiuj“ ni devus respondi kun artikolo: la fakturoj.

§ 76/97. Ne estas konvinka la regulo pri uzo de artikolo, se adsubstantivo estas determinita per de-prepozitivo (min tre ĉagrenas la perdiĝo de tiu letero). En tiu ĉi ekzemplo la perdo certe estas konata. Sed se antaŭ „perdiĝo“ ni metuŝ epiteton, ekz. „eventuala perdiĝo“ (ia perdiĝo)? . . . Evidente, tiu ĉi estas el la pluraj elpensitaj reguloj havantaj nenian sencon, krom kompliki simplajn aferojn.

§ 86/108. Kial „nul horo“ kaj ne laŭregula — „nula horo“?

§ 86/109. Tre nenature oni apartenigas „ambaŭ“, „lasta“, „fina“ al la numeraloj.

§ 95/131. PAGE parolas pri ses „akcesoraj“ tempoj (krom la tri ĉefaj). Sed kiuj ili estas? Se temas pri la malsimplaj verbo-tempoj, ili estas 9 nur en aktivo kaj same tiom en pasivo, kaj ankoraŭ po 9 por la du voĉoj de la infinitivo, la imperativo kaj la kondicionalo.

§ 119/163. Estas miksitaj la nocioj: ag-verbo kaj transitiva verbo. Ne ĉiu ag-verbo estas transitiva.

§ 192/263. Malĝuste PAGE klarigas la ne-uzon de akuzativo post prepozicioj „de, el preter, al, ĝis“, ĉar „ili per si mem jam sufiĉe esprimas la movon“. Tie ĉi malprave identiĝas la demovaj kun la almovaj prepozicioj „al“ kaj „ĝis“. Nur al tiuj lastaj rilatas la klarigo. En la aliaj okazoj oni ne uzas akuzativon ne pro ĉeesto de la montritaj prepozicioj. Tia aserto kontraŭas al la skribitaĵo komence de la sama paragrafo, ke „la akuzativo ne dependas de la uzo de tiu aŭ alia prepozicio, de tiu aŭ alia verbo, sed nur de la esprimota ideo: de tio, ĉu la prep-vo estas la vera celo (direkto) de la movo aŭ ne“. Kaj ĉar la demovaj prep-voj ne montras la celon, la finan punkton, sed nur la komencon de la movo (de, el), eĉ se ni forigus la prepoziciojn, ni ne rajtas akuzativigi la substantivon.

§ 105/275. Malfacile oni povus ekkredi, ke „ĉiujare kunveni“, „tutmonde okazi“, „iri en direkto de. . .“, „ekzistas nur en la fabelo“ estas manier-indikaj adjektoj.

§ 178/243. La aserto, ke ĉiu verbo povas esti uzata transitive, estas rekte erariga. La aŭtoroj miksas la akuzativon anstataŭ prepozicio kun la transitiveco de la verbo. Se ni diras, „ŝi ne dormis tutan nokton“, la akuzativo post la verbo tute ne transitivigas ĝin. Laŭ §119 la ago de la transitiva verbo „celas, atingas, koncernas personon aŭ aferon“, t.e. ĝi havas objektan komplementon. Laŭ PIV „transitiva“ signifas: „tia, ke ĝi esprimas agon, kiu pasas de subjekto al objekto“. En la supra ekzemplo „tutan nokton“ ne estas objekto, sed cirkonstanca komplemento. Do, la akuzativo ne ŝanĝas la naturon de la verbo. Kontraŭa starpunkto estigus haoson.

La plej esenca malperfektaĵo de la libro tamen estas la troa komplikado de esence simplaj aferoj. Ĝi komenciĝas jam en la unuaj paĝoj kaj penetras la tutan verkon.

Ekzemple, la komplika regularo por transliniigo? — Kaj la elsuĉaĵo pri multaj gramatikaj kazoj (elativo, terminativo ktp.)?

Ĉu iu kredas, ke homoj, en kies nacia lingvo ne estas konataj vasteco kaj longeco de vokaloj post tralego de la malsimpla plektaĵo de reguloj komencos prononci laŭ ties direktivo?

La konsiloj pri -ita, -ata, (§ 114/155) estas tiel embarasaj, ke apenaŭ iu povus praktie utiligi ilin.

Kaj la mirinde kapturna plektaĵo de terminoj rilate la objektan komplementon (§ 177/241)!

Tralegu la difinojn de propozicio kaj frazo sur paĝo 290 kaj provu ilin kompreni post la unua tralego! Vane! Tiajn elturnitajn difinojn en naciaj gramatikoj mi ne renkontis ĝis nun.

Paĝoj 271—273 prezentas veran ĝangalon, en kiu la leganto perdiĝas.

Nu, pensis mi, jen jam mi venas al la parto pri la vortfarado kaj fine mi eliros el la ĝangaloj kaj ekpromenos en la helaj aleoj de la simpla, interesa kaj agrabla Esperanta vortfarado. Ho ve! Evidentiĝis tute alio. Tie ĉi ankaŭ senfinaj terminoj, subterminoj, terminoidoj, pseŭdoterminoj, reguloj, subreguloj, esceptoj de la reguloj, pseŭdoreguloj. . . Ĝi montriĝis plej kaprompa!

Ekzemple la reguloj pri la uzo de -ig (§ 358) estas tiel komplikaj, ke mi forte dubas, ĉu eĉ la plej talenta lernanto povus orientiĝi.

La ekstera aspekto estas bela. La tekstoj bone paĝigitaj kun multaj subtitoloj kaj paragrafoj presitaj sur margenoj, kio ege faciligas la legadon.

Malfaciligas la legadon kaj la serĉadon manko de depaŝoj ĉe komenco de alineo. Mi ne scias al kiu plaĉas tiu moda rektlinia komenĉiĝo de la preslinioj en la paĝo, sed ĝi efektive enuigas kaj lacigas (bedaŭrinde tiel estas presata ankaŭ revuo „Esperanto“).

Malfaciligas ankaŭ la longaj paragrafoj, ampleksantaj kelkajn titolojn.

Lacigas la troa uzado de etaj litertipoj.

KONKLUDO

La listo de la malĝustaĵoj kaj malperfektaĵoj estas longa (mi tute ne elĉerpis ĉiujn), tamen se ni konsideras la amplekson de la libro (599 paĝoj), ties nombro ne estas tiel granda por ombrigi la pozitivajn flankojn. Kiel mi menciis, la plej granda malavantaĝo estas la komplikado. La aŭtoroj certe sentas ĝin, ili ricevis kritikojn tiurilatajn, pro tio en la komenco kaj en la fino serĉas senkulpiĝojn. Tamen ni ne pova konsenti kun ilia aserto, ke tio estas neevitebla. PAGE lasas impreson, ke Esperanto estas la plej malfacila lingvo en la mondo, ĉar la plenaj nacilingvaj gramatikoj, kvankam pli ampleksaj, ne estas tiel ĝangale embarasaj.

Kompreneble, eĉ en tiu ĉi formo PAGE ne perdas sian grandan signifon kiel baza verko de la esperantologia literaturo ĝis la apero de nova, same plena, tamen pli simpla, sen malnecesaj komplikaĵoj, efektive alirebla al ĉiuj gramatikoj.



SKOLTISTINOJ EN ĈADRIOJ

Vladimir Diviš

Mi haltis surprizite staranta ĉe la pordo. Ankoraŭ unufoje mi konvinkiĝis, ĉu mi havas bonan adreson. Malnova surskribo „Hotelo“ super la pordo memorigis, por kio ankoraŭ antaŭ kelkaj jaroj servis tiu ĉi kelketaĝa konstruaĵo. Sed la revolucia bolado ne tre asociiĝis al la disvolvo de turismo. Anstataŭ elegante vestita akceptisto, submienis malantaŭ bariera tablo juna viro kun aŭtomatpafilo pendigita sur seĝo.

Eble mi kun mia akompananto ne akiris lian konfidon. Ni atendis en la halo la komandanton, kiam subite malfermiĝis la pordo kun surskribo el pli frua tempo „office“. La halo pleniĝis per kelkaj armitaj viroj en verdaj soldatuniformoj. Tra la malfermita pordo mi vidis anstataŭ skribotablo de la eksĉefo de la hotelo kelkajn metalitojn, en la angulo apogitajn armilojn kaj kelkajn skatolojn kun municio. Post mallonga klarigado la vojo al dua etaĝo estis libera.

Antaŭ kelkaj tagoj mi petis la ministerion de informado pri permeso renkontiĝi kun junaj membrinoj de la Demokratia Organizaĵo de Virinoj en Afganio (DOVA), kiuj lastjare frekventis paraŝutekzercejon kaj jam kelkfoje partoprenis kun armilo enmane batalon kontraŭ banditoj. Logike mi atendis, ke la junulinoj mem zorgas pri sia sekureco. Ja ili jam ekde la unua batalo akiris ĉe la malamiko konvenan respekton pro sia maltimo kaj braveco. Malgraŭ tio, en la teretaĝo de la konstruaĵo, apartenanta al la organizaĵo de afganaj virinoj, mi renkontis nur virojn.

Firmaj ligiloj de centjaraj tradicioj

Ili sidis ronde en komfortaj brakseĝoj, en plaĉaj vestoj, modaj botoj kun mallarĝaj kalkanumoj, kun zorge aranĝitaj hararoj kaj bone flegitaj vizaĝoj. Ili estis tri paraŝutistinoj, junulinoj eble eĉ ne dudekkvinjaraj, kiuj ankoraŭ antaŭ nelonge ekzerciĝis pri saltado per paraŝuto, kiel diversmaniere likvidi la malamikon, pafi per diversaj armiloj, stiri militveturilojn kaj kamionojn. Ili ridetis kaj mienis, kvazaŭ ili ne sukcesus distingi pafilon dis de mitraleto. Unuavide junaj virinoj, centojn el kiuj oni povas renkonti sur la stratoj de Kabul. Sed en aliaj partoj de la lando, kaj precipe en la provinco, la situacio estas tute alia. En iuj vilaĝoj kaj malgrandaj urbetoj mi renkontis eĉ ne unu virinon kun nevalita vizaĝo.

Nur homamasoj da anonimaj figuroj kaŝitaj sub multfaldita „ĉadrio“, longa vualo pendanta ofte ĝis la tero, transĵetita super la kapo, nur ĉirkaŭ la okuloj interrompita per densa teksaĵo

de reteto, ebliganta almenaŭ parte vidi.

Ĉi tiujn virinojn la edzoj devigas ĝis nun senkeniĝe respekti la miljarajn tradiciojn.

„Kaj pro kio enkonduki iujn senbezonaĵojn novaĵojn? Ja edzinon mi aĉetis por ke ŝi servu al mi, nasku al mi infanojn, ordigu kaj kuiru, sed ne ke fremdaj viroj okulumu ŝin.“

Eble tiel opinias en hodiaŭa Afganio ankoraŭ multaj viroj. La katenoj de tradicioj kaj moroj restas ĉiam ankoraŭ tre firmaj. Kaj iam por la viroj oportunaj. Edzino estas laŭ ili nur simpla havaĵo. Objekto sen rajtoj, senigita de ebleco defendi aŭ ŝirmi sin.

En la sesdekaj jaroj komencis aperadi sur la stratoj de l'afgania ĉefurbo ĉiam pli ofte aŭdacaj junulinoj kun malkaŝitaj vizaĝoj. Ili multe riskis. Grupoj da islamaj fanatikuloj ilin atakis kaj kripligis per raziloj iliajn vizaĝojn, en iuj okazoj eĉ forrabante kaj bestece mortigante siajn viktimojn. Tute senpune. Nuntempe kompreneble similaj agoj en Afganio ne plu okazas. Se tamen sur la strato de Kabulo aperus sola kaj krom tio ankaŭ armita virino, eble ŝi devus rezisti kontraŭ multaj problemoj.

Hafizullah' Amin' tute ne respektis la profundan religian konvinkon de la granda plimulto de l'afgana loĝantaro. Kompreneble, la rezulto estis kontraŭa. La nunaj partiaj kaj ŝtataj gvidorganoj gvidataj de Babrak Karmal elektis alian vojon por influi la kredantojn.

„Pro tio ni preferas ne aperigi en gazetaro, televido kaj radio fotojn, filmojn aŭ raportaĵojn pri niaj armitaj junulinoj“, aldonas klarige Balĝan, prezidantino de la Kabula virinorganizo DOVA. Rezulto de simila publikeco povus esti eĉ kontraŭa, ĝuste pro transvivantaj opinioj pri virinaj rajtoj.“

La nevidebla fronto

Preskaŭ ducent virinoj kaj junulinoj ĝis la pasinta majo frekventis paraŝutekzercadon en Akademio de Sekurefortoj en Kabulo. La kurso en normalaj kondiĉoj daŭras tri jarojn. En paca tempo. Sed nun la revoluciaj fortoj devas ĉiutage batali kun kontraŭrevoluciaj bandoj. Pro tio ĉiu, kiu estas preta kun armilo enmane kontraŭstari reakciajn, fortojn, estas bone akceptata. Pro tiu kialo ankaŭ la tempo de ekzercado estis reduktita nur je ses monatoj. Por viroj ĝi ne estas tro longa tempo. Sed ĉu ankaŭ por virinoj, havantaj gefilojn, edzon, gepatrojn?

Ummina Entesar restigis hejme dekjaran filon kaj sepjaran filinon. „Mi havis eble plej facilan situacion el nia triopo. La edzo estas serĝento en nia armeo, li apartenas samtempe al antaŭrevoluciaj partianoj. Li do tute ne kontraŭparolis.“

Tuj apude staris samaĝa Mari Alim, nigrahara junulino, vestita en sabloflava strikta kostumo.

„Ĉe ni hejme ne estis tiel facile“, ŝi konfesis. „Mia edzo estas juĝisto. Dum la unua periodo post la revolucio li iom malrapide alkutimiĝis al la gravaj ŝanĝoj en la vivo de la lando. Li ne estis partiano. La revolucio estis en nia domo plej ofta temo de niaj polemikaj interparoloj. Fine

mi sukcesis konvinki lin. Pri tio ja atestas la fakto, ke li dum mia ekzercado zorgis kun mia patrino pri niaj kvar gefiloj.“

Plej bone fartis Jamila. Ŝi ankoraŭ ne edziniĝis. Kaj la gepatroj? La patro, malnova revoluciulo, mortis en malliberejo de Amin, kaj la patrino estis kontenta, ke la filino daŭrigas la vojon de la patro.

Jam en la lasta jaro la junulinoj forveturadis al la „frontlinio“ rekte batali kontraŭ bandoj de kontraŭrevoluciuloj. Sed ĉi tiuj jam dua jarduono lastjara, kaj ankoraŭ pli karakterize en la printempo de la kuranta jaro iompostiome ŝanĝis la taktikon. De malkaŝa batalo en la regionoj kaj en grandaj grupoj, ili transiris al teroragoj kontraŭ la loĝantoj en urboj kaj vilaĝoj fare de malgrandaj grupoj. Per bomboeksplodoj, mortigatencoj kontraŭ antaŭe destinitaj homoj, kompreneble plej ofte kontraŭ partiagantoj, revoluciaj soldatoj kaj komandantoj, religiaj gvidantoj subtenantaj la revoluciajn ŝanĝojn.

„Al tio adaptiĝas ankaŭ la ŝanĝo de nia taktiko“, aldonis Ummina. „Ni formetis mitraletojn kaj grenadojn kaj ekiris al la nevidebla fronto. Hieraŭ ni revenis de la sudo, kaj alia nia taĉmento samtempe revenis el okcidenta provinco Herat. Ni aktivis en la regionoj kun pligrandigita aktiveco de la banditoj, kunlaborante kun aktivistoj de la sekureservo kaj kontraŭskolta servo. Pro tio ni devis anstataŭigi la kamuflitan soldatveston per ĉadrio kaj la mitraleton per pistolo.“

Banditoj kamuflitaj per jupe

„Ni ricevadis taskon traesplori kune kun membroj de la kontraŭskoltado revestitaj kiel simplaj kampuloj en proksima ĉirkaŭaĵo de la domoj en urbeto kie laŭ ricevitaj informoj povus kaŝiĝi banditoj“, aldonas Jamila. „En ĉadrio tio estis tre malkomforta. Sub la vualo mi ŝvitis kiel eble neniam antaŭe. Sed ĝi ebligis al mi okaze de danĝera situacio rapide kaj nerimarkite elŝovi la armilon.“

„Ĉu tio estis iam necesa?“

„Kompreneble.“

Sed ĉadriano eluzas ankaŭ la malamiko. Tiu ĉi tradicia faldoriĉa vualo de la islamaj virinoj estas en nuna Afganio ofte uzata kiel masko fare de la banditoj. Jam antaŭe mi aŭdis pri Mari lige kun senmaskigo de du komandantoj de la pakistana skoltservo, plenumantaj taskon organizi vastan kontraŭrevolucian agadon en Kabul.

Junulinoj de DOVA jam delonge helpas gardi la trankvilon kaj ordon ankaŭ en la ĉefurbo. Dum patrolado Mari rimarkis du neordinare altstaturajn kaj fortikajn „virinojn“ en ĉadrio. Ŝi diskrete aliĝis al unu el ili kaj per rapida palpado de la mano pruvis sian supozon. La masko estis malkovrita. Du danĝeraj fremdaj agentoj, kiuj aŭdace alvenis ĝis la ĉefuro, estis baldaŭ arestitaj.

Sed tio ne estis ununura okazaĵo. Ĝis nun la junulinoj el la Demokratia Virin-organizaĵo per similaj metodoj malkovris pli ol kvindek tiama-

niere maskitajn banditojn, kaŝiĝantajn sub vualo kaj en jupe.

Informo inter pantranĉaĵoj

„En Herat iun vesperon turnis mian atenton plenaĝa virino kaŝita sub ĉadrio — rememoras pri unu el siaj travivaĵoj Jamila, — „kaj proponis al ni du pantranĉaĵojn kun fromaĝo interne. Ni iomete hezitis, ĉu ekmanĝi aŭ ne. Ni malsatis, sed antaŭe atente trarigardis la fromaĝotranĉerojn. Ni estis surprizitaj trovinte sur la fromaĝo paperon kun skribita lakona informo: hodiaŭ post noktmezo en proksima domo kunvenos komandantoj de kelke da lokaj bandoj. . . Kompreneble, ni unue devis elimini la eblecon, ke temas pri insidinformo. La virino, kiel ni poste eksciis, estis nek membrino de la partio, nek simpatiis kun ni. Ŝia riĉa edzo, posedanto de pliaj kvar edzinoj, ne apartenis al la adeptoj de la revolucia transformiĝo de Afganio.“

Dank'al la sentima virino la banditoj estis fine kaptitaj kaj laŭmerite juĝitaj. La tutan operacion antaŭis detala traserĉo de la ĉirkaŭaĵo, kiun kompreneble partoprenis ankaŭ niaj junulinoj. Certe ĝi estis danĝera operacio. Sed nek unua, nek lasta.

Esperantigis: J. Tomiček

Gloso:

ĉadrio — Vualo kovranta kapon kaj tutan korpon de virino en iuj arabaj landoj



USSR

Aluksne, 228738 Latva SSR, Kultura domo, Esperanto-klubo „Flamo“: Prezidanto, E-instruisto Kovnators Naumo, 23 j., USSR, Aluksne, 228730, Latva SSR, Omskas str. 16—2, b. k. p. m., lingvoj, kritiko
Gekursanoj bonvolu skribi al adreso de la klubo kun indiko de familia nomo).


Kruzs Ardoņa, 45 j.-ing. geodezisto, pri poezio, literaturo, pm, bk.

Belodjedova Svetlana, 22 j., oficistino, pri poezio, fiziko
Ozolinja Mara, 17 j., lernantino, pri lingvoj, historio, bk., pm., glumarkoj

Vagner Svetlana, 16 j., lernantino, pri sporto, muziko, filmoaktoroj, bk.

Fjodorova Larisa, 16 j., lernantino, pri fotado, libroj, fotoj pri kinoaktoroj, b. k.

Mednikova Ljudmila, 14 j., lernantino, pri bk. de floroj, p. m.



Tannaja Roza F. 252186 Kiev, bulv. Lenin 14, kv. 78, 19-jara, studentino, tm. pri ĉt. Interesiĝas pri poezio, literaturo, muziko, Kol. librojn, glumarkojn, insignojn, diskojn.

Esperanto-rondeto el 8 knaboj 13—16 jaraj, pri ĉt, kun tm. Adreso: Litovio, 235643 Alsedziai, Plunges raj. Vidurinė Mokykla.

„Volgograda E-klubo organizas grandan porpacan ekspozicion en majo 1982 jaro. Bonvolu sendi ĉion al adreso: „USSR, 400026, Volgograd-26, bul. Engels, 1-a, DK „Himik“, Esperanto-klubo.

Rekompence ĉiu sendinto ricevos aĵon pri Volgogrado kaj novan pentraĵpanoramon „Stalingrada batalo“.

Jaro XXIX. № 1

Januaro-februaro 1982

REDAKTA KOMITATO

Violin Oljanov — Ĉefredaktoro (Bulgario)

Nikola Aleksiev (Bulgario)

D-ro Detlev Blanke (GDR)

André Cherpillod (Francio)

William Gilbert (Francio)

Oldrich Knichal (ĈSSR)

Kimiaki Kurita (Japanio)

Nguyen Hac Trung (Vjetnamio)

Boleslav Staszak (Pollando)

Lingva revizio: Asen Grigorov (Bulgario)

Arta redaktoro: Laurette Prijobilovska (Bulgario)

Korektis: Rajna Konstantinova (Bulgario)

La Redakcio atendas kontribuojn de pacamikoj el la tuta mondo. Ju pli da kunlaborantoj, des pli varia kaj interesa revuo. Pro la nesufiĉa spaco la materialoj ne estu pli longaj ol 60 tajpitajn liniojn; nur en gravaj kazoj ĝis 90. Ili estu prefere tajpitaj aŭ tre klare mane skribitaj kun sufiĉa interlinia spaco kaj margeno, sur grandaj folioj de kancelaria formato. La Redakcio akceptas nur originalan (unuan) ekzempleron de la tajpaĵo. Kopioj estas lasataj sen konsidero. Skribu klare viajn nomojn kaj adresojn en nacia lingvo! La Redakcio ne resendas neuzitajn materialojn.

KEIN SKRIBI

Honora Prezidanto: Nikola Aleksiev, str. Nezabravka 1, vhod 2, 1113 SOFIA, Bulgario.

Prezidanto: D-ro Pethes Imre, H-1940, BUDAPEST VI. Nepköztársaság utja 73, Hungario.

Vicprezidantoj: D-ro Magomet Isaev, prosp. Kalinina 14, MOSKVA K-9, USSR

Glady Claude, 36 Marne Str. B-1030-BRUSSEL, Belgio.

Generala sekretario: William Gilbert, 30 rue Croix-Montoire, 37100 TOURS, Francio.

Sekretarioj: Syozi Nanba, Huruti 3-13-26, Zyôto-ku, OSAKA, Japanio.

Inĝ. Angel Todorov, bulv. Emil Markov, bl. 37. II. 1404 SOFIA, Bulgario.

Ĉefredaktoro: Violin Oljanov, kv. Emil Markov, PK 66, 1404 SOFIA, Bulgario.

Centra administrantino: Vasja Petrova, Bulgara MEM-Komitato, bulv. Hristo Botev 97, 1303 SOFIA, Bulgario.

Centra kasisto: (Por la okcidentaj landoj) Pierre Jouvin, 14 rue Thiers, 76120 GRAND QUEVILLY, Francio, (Poŝtkonto CCR-ROUEN, 102-45 p.)

Respondeculo pri landaj numeroj de „PACO“: Helmut Fuchs, Hohe Str. 33, DR-83, PIRNA, GDR.

kie aboni:

Aŭstralio: N. A. Collier, 7 Monomeeth St. BUDERIM, Qld. 4556.

Aŭstrio: Ernesto Quietensky, Pappenheimgasse 70/3/12 A-1200 WIEN AŭS. 100

Belgio: Glady Claude, 36 Marne Str. 1030 BRUSSEL.

Brazilo: F-ino Elma Nascimento, str. D. Claudina №100 apt. 402 MEIER RIO DE JANEIRO, RJ-CEP 20. 721

Britio: Paul Hewitt, Laycroft, Main Road, COZENHAM, Louth, Lincs, LN11, OPF £ 4

Bulgario: Bulgara MEM-Komitato, bulv. Hristo Botev 97, 1303 SOFIA 3 levoj

Ĉeĥoslovakio: Ĉeĥa Esperanto-Asocio, MEM-Sekcio, Jilska 10, 11000 PRAHA 1 30 kronoj

Danlando: Egon Starup, Brovaenget 26, DK-2700 KOBENHAVN BRN. 35 d. kr.

F. R. Germanio: Roland H. Hegen, Iggelbach, Schlossgasse 30, D-6731 ELMSTEIN 20 DM

Finnlando: Erkki Järvinen, Ukonkivenpolku 2-1-68 01610 VANTAA 61 30 fin. m.

Francio: Roger Degrelle, B. P. 23, F-54510 Tomblaine (771.77 R. Nancy — poŝtĉekkonto) 40 fr. fr.

Germana Demokratia Respubliko: Centra Laborrondo Esperanto en la Kulturligo de GDR, Charlottenstr. 60, 108 BERLIN 30 DM

Hispanio: Luis Serrano Pérez, Font Nova 32, SABADELL (Barcelona) 750 pesetoj

Hungario: Hungara MEM-KOMITATO, H-1368 BUDAPEST 5, pf. 193 36 forintoj

Italio: Riccardo Pinori, V, le Ghisleri 9/15, I-00176 ROMA (p. ĝ. k. 64882004).

Japanio: Kurita Kimiaki, 411 Misima, Yata Sakuragaoka 1209-98 (Japana Pacdefenda Esperantista Asocio).

Kubo: Rufino López, Havana Esp.-Rondo. Poŝtkesto 314, HABANA 1

Norvegio: Olaf Reiersol, Buerstad, N-3155 TOROD

Pollando: RUCH — WARSZAWA.

Portugaliao: Portugala E-Asocio, Rua Dr. Joao Couto 6 RC A-LISBOA 350 eskudo

Rumanio: Cosma Dorin, Muzicescu 26, sc. C, ap. 11, R-1900 TIMISOARA

Socialisma Respubliko Vjetnamio: Vjetnama Pacdefenda Esperantista Asocio, 107 Quan Thanh, HANOJ

Sovetunio: Unuiĝo de sovetaj societoj pri amikecaj kaj kulturaj rilatoj kun aliaj landoj, prosp. Kalinina 14, MOSKVA K-9 1,80 rubloj

Svedio: Tomas Jansson, Väktargatan 26 D, S 754 22 UPPSALA

Usono: Bern Wheel, 834, Wenonah Ave, Oak Park, IL 60 304 dol. 6,50

Aliaj landoj: Bv. turni vin al unu el la ĉi-supraj adresoj aŭ al Pierre Jouvin (centra kasisto — vd. maldekstre).

GRAVE!

Abonpagojn el socialismaj landoj sendu al 1303 SOFIA, bulv. Hristo Botev 97 (por „Paco“). El nesocialismaj landoj — al la adreso de la Centra kasisto — 40 fr. fr.

ISSN 0204-904X